

HEJMA VORTARO

Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto

Unua libroforma eldono:
Universala Esperanto-Asocio 1999

**Ĉi tiu paĝo estas ĝisdatigata.
En referencoj al la fontoj povas aperi mankoj kaj eraroj.**

Redaktoro: Jouko Lindstedt

Nacilingvaj respondeculoj:

angla Brian Moon, *finna* Jouko Lindstedt, *franca* Suzanne Bolduc, *germana* Rudolf Fischer, *hebrea* Amri Wandel, *hispana* Jorge Camacho, *hungara* HIDEG Sándor, *itala* Mauro La Torre, *japana* NAGATA Hiroshi, *nederlanda* Jorg De Mulder, *pola* Vito Redsky, *portugala* Cícero Soares, *rusa* Alexander Shlafer, *sveda* Martin Strid

Hejma Vortaro proponas Esperantajn nomojn por diversaj ĉiutagaj aferoj. Ĝi ne estas traduka vortaro el Esperanto en naciajn lingvojn aŭ inverse. Tiuj ĉiutagaj aferoj estas rekoneblaj per la Esperant-lingvaj difinoj, helpataj de la nacilingvaj tradukoj. Tial la Esperanta kapvorto povas havi pliajn signifojn, kiujn la difino aŭ tradukoj ne montras. Se du Esperantaj vortoj estas indikitaj kiel sinonimoj per la signo "=", ankaŭ tio koncernas nur la difinitan signifon: unu el la vortoj povas ja havi kromajn signifojn, kiujn oni ĉi tie ne mencias.

La nacilingvaj tradukoj ne plene koincidas kun la difinoj, nek unu kun aliaj. Ĉar la realoj, en kiuj la Esperantaj familioj vivas, varias de lando al lando kaj de regiono al regiono, la Esperantaj vortoj ne povas havi ĉie tutsaman signifon. Mi scias, ke kio en mia familio nomiĝas "bulko", ne aspektas kiel la "bulko" de iu familio alilanda. Tamen estus eraro difini "bulkon" tiel precize, ke ĉi tie aŭ tie oni ne plu povus uzi la vorton. La variado de la ĉiutagaj vortoj estas kutima afero en ĉiuj lingvoj parolataj en multaj landoj, kiel cetere montras ankaŭ la laŭlanda variado de la anglaj, francaj aŭ hispanaj tradukoj en *Hejma Vortaro*.

Mallongigoj uzataj: KP = komparu, (R) = registrita varmarko, RIM = rimarkigo, ? = necerta traduko.

Sigloj de lingvoj: AN = angla, FI = finna, FR = franca, GE = germana, HE = hebrea, HI = hispana, HU = hungara, IT = itala, JA = japana, NE = nederlanda, PL = pola, PT = portugala, RU = rusa, SV = sveda. La mallongigoj por la diverslandaj varioj de ĉi tiuj lingvoj estas ĝenerale memkompreneblaj, sed rimarku, ke en la

hispana la mallongigo "(Am.)" signifas la andaluzan, ekstremaduran aŭ amerikan variojn.

Sigloj de fontoj: EB = Esperanta Bildvortaro (R. Eichholz, 1988–1989); MIL = Mil unuaj vortoj en Esperanto (nova eldono 2004, trad. E. Grimley Evans); PB = Praktika Bildvortaro (1979); PIV1 = Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto ("la malnova PIV" de 1970); PIV2 = La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2002); PV = Plena Vortaro (1934); PMEG = [Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko](#) (B. Wennergren); ReVo = [Reta Vortaro de Esperanto](#); Z = Zamenhof (ofte citata laŭ vortaroj). La fontoj estas indikataj ne konsekvence, sed nur laŭbezone ekzemple en la rimarkigoj.

Ĉar ĉiu vorto aŭ esprimo havas propran artikolon, la alfabeto ordo ne estas laŭradika, sed baziĝas sur ĉiuj literoj de la vortoj, inkluzive la finaĵojn. Aparta aldonajo listigas [son-imitajn verbojn](#).

Antaŭparolo de la unua eldono (1999)

Tiu ĉi vortareto celas helpi tiujn parolantojn de Esperanto, kiuj uzas la lingvon hejme kiel ĉiutagan komunikilon. Ordinara vortaroj ja ne ĉiam utilas, kiam oni serĉas nomon por iu enhejma aĵo aŭ ago. Kompreneble oni ofte povas utiligi la riĉan vortofaran sistemon de Esperanto por mem krei taŭgajn vortojn, sed estas bone ekscii, kiel aliaj familioj Esperant-lingvaj solvis similajn problemojn. *Hejma Vortaro* tamen ne strebas al plena unueco de la enhejma Esperanto, ĉar la tre variaj lokaj cirkonstancoj ja nature speguliĝas ĝuste en la lingvaĵo ĉiutaga. Oni rigardu ĉi tiun vortaron kiel helpilon, ne kiel la normon.

La materialon por la vortaro kolektis la anoj de la komputil-reta diskutejo [DENASK-I](#) kaj la kunlaborantoj de [Rondo Familia](#) de UEA. Ĝi ne estas provo sisteme kovri la centran vortostokon pri hejmaĵoj – ĝi estas nesistema kaj iom kaprica kolekto de vortoj, kiuj jen montriĝis aparte problemaj, jen ŝajnis alikialie diskonigindaj.

La vortaron iniciatis komence de la okdekaj jaroj Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti. La unuan enkomputiligon prizorgis Derek Roff en 1990. La unua provizora paperversio de la vortaro en ties nuna ĝenerala aranĝo estis distribuata de Rondo Familia dum 1997.

Pri la kapvortoj kaj difinoj en ĉi tiu eldono respondecas mi, pri la nacilingvaj tradukoj sole nur la respektivaj nacilingvaj respondeculoj, kies adresaro troviĝas [fine de la vortaro](#). Krom al ili, mi deziras ĉi tie danki ankaŭ al Sten Johansson, kiu multe helpis en la teĥnika redaktado, al Claude Roux, kiu konsilis precipe en botanikaj demandoj, kaj al ĉiuj, kiuj sendis proponojn kaj informojn rete aŭ papere. Neniu el ili kulpas, se mi decidis ne sekvi iliajn konsilojn aŭ prokrastis utilajn aldonojn ĝis la sekva eldono.

Kompilante la vortaron, mi klopodis elekti vortojn, kiuj al mi ŝajnas rekomendindaj por novaj familioj Esperant-lingvaj. Ofte ili estas vortoj uzataj jam en multaj familioj, sed mi ne evitis ĉerpi ankaŭ el eldonitaj vortaroj, se mi en ili trovis proponojn taŭgajn por ĉiutaga uzo. Kelkaj dezirus, ke mi bazu ĉion sur enketoj inter familioj, dum iuj aliaj konsilus min sekvi ekzemple Plenan Ilustritan Vortaron pli konsekvence. Mi serĉis ian mezan vojon, kvankam tio necesiĝis plurajn subjektivajn decidojn.

Mi esperas, ke ĉi tiu unua eldono de *Hejma Vortaro*, kvankam modesta kaj mankhava, helpos novajn Esperant-lingvajn parojn kaj familiojn pensi malpli pri la lingvo mem, kaj pli pri la tuthomaraj valoroj, kiujn ĝi peras kaj portas.

En Lahti, la tagon de la 150-jara jubileo de *Kalevala* (28 februaro 1999)

[Jouko Lindstedt](#)

A

acid/krem/o Kremo acidigita (PIV2). AN sour cream FI hapankerma, smetana, kermaviili FR crème sure f. GE die saure Sahne HE ? HI nata f. líquida HU tejföl IT panna fermentata, panna acida JA ? NE zure room m. PL kwaśna śmietana PT ? RU сметана SV creme fraiche, gräddfil

aĉet/ĉar/et/o Veturilo, en kiun oni kolektas aĉetaĵojn en memserva vendejo (PIV2, simpligita). AN shopping trolley, supermarket trolley FI ostoskärryt FR chariot m. GE der Einkaufswagen HE ? HI carr(it)o m. de la compra HU (bevásárló)kocsi IT carrello (del supermercato) JA kâto NE winkelwagentje; (Fl.) kar v.(m.) PL koszyk PT carrinho de compras RU тележка (магазинная) SV kundvagn KP [infanĉareto](#), [rulsako](#) RIM Ofte nura "ĉareto" sufiĉas.

ajl/o Herbo (*Allium sativum*) kun fortaj odoro kaj gusto, precipe ĝia bulbo. AN garlic FI valkosipuli FR ail m. GE der Knoblauch HE ŝum HI ajo m. HU fokhagyma IT aglio JA ninniku NE knoflook o.(m.) PL czosnek PT alho RU чеснок SV vitlök KP [ajlopremiilo](#), [bulbo](#), [cepo](#), [ŝenoprazo](#)

ajl/o/prem/il/o Tenajlo-simila ilo por mane dispremi ajlerojn. AN garlic squeezer, garlic crusher FI valkosipulinpuristin FR presse-ail m. GE die Knoblauchpresse HE ? HI triturador m. de ajos, prensaajos m. HU fokhagymanyomó IT schiacciaaglio JA ninniku ŝiboriki NE knoflookpers v.(m.) PL ? PT espremedor de alho RU ĉesnokodavilka, ĉesnoĉnica SV vitlökspress KP ajlo

akaĵu/o Ŝajnfrukto de akaĵuarbo (*Anacardium occidentale*), konsistanta el du partoj: akaĵu-pomo kaj akaĵu-nukso (laŭ PIV2). Almenaŭ en Eŭropo, "akaĵuo" estas uzata ankaŭ pri la nura [nukso](#). AN cashew nut FI (nukso) cashewpähkinä, (pomo) acajouomena FR (nukso) noix de cajou f., (pomo) pomme de cajou f. GE die Cashewnuss HE ? HI anacardo m. HU kesudió IT anacard(i)o, (pomo di) Acagiù; (noce dell') anacardio, noce di Acagiù JA (nukso) kaŝûnaccu PL ? PT (pomo) caju; (nukso) castanha de caju NE cashewnoot v. RU (nukso) oreĥ keŝ'ju; (pomo) jabloko keŝ'ju SV (nukso) cashewnöt; (pomo) njurfrukt, acajoufrukt RIM Akaĵunukso estas la vera frukto de la akaĵuarbo: malmolŝela, enhavanta semon manĝatan kruda aŭ rostita. Akaĵupomo estas la fruktosimile ŝvelinta, flava aŭ ruĝa supra parto de la pedunklo de la akaĵuarbo, portanta la akaĵnukson; ĝi gustas kvazaŭ pomo kaj estas uzata por farado de suko, kaĉo, konfitaĵo, vino kaj brando.

akv/o/melon/o Planto el la genro *Citrullus* kaj ĝia frukto, manĝata freŝa. AN watermelon FI vesimeloni FR pastèque f., melon d'eau m. GE die Wassermelone HE avati'aĥ HI sandía f. HU görögdinnye IT cocomero, anguria, melone d'acqua JA suika PL ? PT melancia NE watermeloen m. RU arbuz SV vattenmelon

anet/o [Spicherbo](#) *Anethum graveolens*. AN dill FI tilli FR aneth m. GE der Dill HE ŝevet reĥani (tavlin) HI eneldo m. HU kapor IT (a)neto, finocchio fetido JA inondo, ĵiru PL ? PT aneto, luzendro NE dille v. RU ukrop SV dill

anorak/o Sporta vent- kaj pluv-imuna jako, ofte kun kapuĉo. AN anorak FI ulkoilupusero, anorakki, tuulitakki FR anorak m. GE der Anorak HE me'il HI anorak m. HU anorák IT giacca a vento JA anorakku NE anorak m. PL ? PT anoraque; (Port.) quispo RU (kurtka-) vetrovka, anoraka SV anorak KP jakó

antaŭ/ĉambr/o = [vestiblo](#)

antaŭ/tuk/et/o = salivtuko

arakid/o = [ternukso](#)

artiŝok/o Planto el la genro *Cynara* kaj ĝia manĝebla "floro" (kapitulo). AN (globe) artichoke FI (latva-)artisokka FR artichaut m. GE die Artischocke HE aritŝok HI alcachofa f. HU articsóka IT carciofo JA ĉôsen azami, âtiĉôku NE artisjok v. PL ? PT alcachofra RU artiŝok SV kronärtskocka

askalon/o = ŝaloto

aŭskult/il/o La parto de telefono, kiu enhavas mikrofonon kaj malgrandan laŭtparolilon, kaj kiun tenas la uzanto. AN receiver FI luuri FR combiné m. GE der (Telefon)Hörer HE oznija HI auricular m. HU telefonkagyló IT microtelefono, ricevitore, cornetta JA ĵuŭaki NE hoorn m. PL ? PT fone RU trubka (telefonnaja) SV telefonlur KP kapaŭskultiloj, laŭtparolilo = parolilo, poŝtelefono = portebla telefono RIM PIV1 enhavas "aŭdilo".

avel/o [Nukso](#) de avelujo, arbeto el la genro *Corylus*. AN hazelnut FI hasselpähkinä FR noisette f. GE die Haselnuss HE -egoz (-ilsar) HI avellana f. HU mogyoró IT nocciola, nocciolina JA haizeru naccu NE hazelnoot v. PL ? PT avelã RU lesnoj oreĥ, funduk SV hasselnöt KP juglando, [nukso](#), [ternukso](#) = arakido

aven/flok/o/j Avengrajnoj vaporumitaj kaj plat-premitaj. AN porridge oats, rolled oats FI kaurahiutaleet FR flocons d'avoine m. pl. GE die Haferflocken HE dajsat ŝibolet ŝual HI copos m.pl. de avena HU zabpehely IT fiocchi di avena JA ôtomîru NE havervlokken v. PL ? PT flocos de aveia RU ovsjanye ĥlop'ja SV havregryn KP aveno

aven/o Greno el la genro *Avena*. AN oats FI kaura FR avoine f. GE der Hafer HE ŝibolet ŝual HI avena f. HU zab IT avena JA karasumugi NE haver v.(m.) PL ? PT aveia RU ovës SV havre KP avenflokoj

B

([balancilo](#) [biskvito](#) [branpano](#) [burgero](#))

babil/et/i (Pri eta bebo:) ekzerci sin produkti parolsonojn kaj silabojn. AN babble FI jokeltaa, jokellella FR babiller GE brabbeln HE lekashkesh HI parlotear, balbucear, balbucir (un bebé) HU gügyög IT ? lallare (emettere lallazione); ? ciangottare JA nango o hanasu NE brabbelen PL ? PT balbuciar RU gul'kat', lepetat' SV jollra

bak/aĵ/o Ĉia bakita manĝaĵo (PIV1), plej ofte tia el faruno. AN cake, pastry, biscuit; cakes and biscuits FI leivonnainen FR (specife) pâtisserie f., gâteau m.; (pli vastasence) aliment cuit au four m. GE das Gebäck HE ? HI bizcocho m., tarta f., torta f. HU sütemény, pékáru IT (cibo cotto al forno) JA kukkî NE koekje, gebak o. PL ? PT assado, comida de forno RU peĉen'je, vypeĉka SV bakverk KP [biskvito](#), [kuko](#), torto

bak/form/uj/o = **bak/muld/il/o** Ujo plenigata per pasto por baki [kukon](#) en [forno](#). AN cake pan, baking tin FI vuoka FR moule m. GE die Kuchenform, die Backform HE tavnit afija HI molde m. (de cocción) HU sütőforma IT tortiera, forma (per dolci) JA jakiki, kukkî gata NE bakblik o., bakvorm m. PL ? PT forma de bolo RU forma dlja vypeĉki SV bakform, ugnform KP bakforno = bakujo, bakpleto

bak/forn/o = **bak/uj/o** [Forno](#) aŭ ties parto, uzata por baki. AN oven FI paistinuuni, leivinuuni FR four m. GE der Backofen HE tanur afija HI horno m. HU sütő, kemence IT forno JA ôbun NE oven m. PL ? PT forno RU peĉ' (russkaja), duĥovka SV ugn, bakugn KP bakformujo = bakmuldilo, bakpleto, [forno](#), kuirforno = fornelo, hejt(o)forno RIM "Bakujo" troviĝas en PIV1.

bak/muld/il/o = bakformujo

bak/plet/o Nefiksita metala plato, kun aŭ sen malaltaj randoj, sur kiu oni bakas panojn kaj [kukojn](#) en [forno](#). AN oven tray; baking plate; (usone) cookie sheet FI (uuni)pelti FR plaque à biscuits f. GE die Backplatte HE tavnit afija HI bandeja f. del horno HU tepsi IT teglia, tiella JA jakizara NE bakplaat v. PL ? PT assadeira RU protiven' SV bakplåt, långpanna KP bakformujo = bakmuldilo RIM Bildo: EB 42/53.

bak/uj/o = bakforno

balanc/il/o Tabulo, sur kiu oni povas lude balanciĝi (pendolilo aŭ baskulo). AN (pendolilo) swing; (baskulo) seesaw FI keinu FR balançoire f. GE (pendolilo) die Schaukel; (baskulo) die Wippe HE nadneda HI (pendolilo) columpio m.; (baskulo)

sub(e)ibaja m., balancín m. HU hinta IT altalena JA ŝisô, buranko NE schommel m. PL ? PT (Port.) baloiço; (Braz.) balanço RU kaĉeli SV gunga; gungbräda KP baskulo, lulilo, pendolilo

banan/o Frukto de bananujo, arbosimila [herbo](#) el la genro *Musa*. AN banana FI banaani FR banane f. GE die Banane HE banana HI plátano m., (Am.) banana f. HU banán IT banana JA banana NE banaan v. PL ? PT banana RU banan SV banan

ban/ĉambr/o Ĉambro, kie oni banas, duŝas aŭ lavas sin; ofte kunigita kun necesejo. AN bathroom FI kylpyhuone FR salle de bain f., salle de bains f. GE das Bad, das Badezimmer HE (ĥadar-)ambatja HI cuarto m. de baño HU fürdőszoba IT (stanza da) bagno JA jokuŝicu, bâsurûmu NE badkamer v.(m.) PL ? PT banheiro RU vannaja (komnata) SV badrum KP necesejo RIM Eblas diri ankaŭ "banejo"; tiu vorto signifas ankaŭ apartan domon por bani.

ban/ej/o KP banĉambro

baskul/o Speco de [balancilo](#): longa tabulo metita sur kuŝantan ŝtipon aŭ alian subtenilon, tiel ke unu persono ĉe ĉiu ekstremaĵo povas alterne leviĝi kaj malleviĝi (laŭ PIV1, 2a signifo). AN seesaw FI keinulauta, kiikkulauta FR bascule f., tape-cul m. GE die Wippe HE nadneda HI sub(e)ibaja m., balancín m. HU mérleghinta IT altalena (a bilico) JA ŝisô NE wip m., wiplank v. PL ? PT gangorra RU kaĉeli SV gungbräda KP [balancilo](#), pendolilo RIM

baz/lern/ej/o = element/a lern/ej/o La unua lernejo de infanoj, laŭlande varie ekde la aĝo de ĉ. 6 jaroj ĝis la aĝo de 12-15 jaroj. AN elementary school, (brite) primary school FI peruskoulu, (pli frue) kansakoulu FR école primaire f., école élémentaire f. GE die Grundschule HE bejt sefer jesodi HI escuela/enseñanza f. primaria HU általános iskola IT scuola di base (6-13j.); scuola elementare (6-10j.); scuola media (inferiore) (11-13j.) JA ŝôgakkô NE basisschool v.(m.) PL ? PT (curso de) primeiro grau (primário = unuaj jaroj + ginásio = 4 lastaj jaroj) RU načal'naja škola, nepolnaja srednjaja škola SV grundskola KP infanejo = infanĝardeno = infanvartejo, mezlernejo = meza lernejo

beb/o/ĉar(/et)/o = infanĉar(et)o

beb/o/kaĉ/o = kaĉ/et/o Flueca kaĉo por malgrandaj infanoj el faruno aŭ industrie farita pulvoro, miksitaj kun lakto aŭ akvo kaj eventuale varmigita aŭ kuirita. AN baby food, Pablum FI (vauvan)velli FR purée f., céréales pour bébé f. pl. GE der Babybrei HE dajsat tinok HI papilla f. (para el bebé) HU gyermekétajszert (pépes) IT pappa, pappina JA bebîfûdo NE pap v., papje PL ? PT mingau, papa RU detskaja smes', detskoe pitanie, kaŝa SV välling KP laktosupo RIM Ne konfuzu ĝin kun anstataŭaĵoj de patrino mamlakto.

beb/o/seĝo Longforma subtena seĝo, en kiu eta bebo povas rigardi la ĉirkaŭaĵon en pozicio duonsida, duonkuŝa. AN baby chair FI vauvantuoli, sitteri, babysitter FR siège pour nouveau-né m., siège pour bébé m., (Fr.) bébé-relax m. GE die Babywippe HE kise tinok HI sillita f. (de bebé) HU csecsemőülőke ? IT (poltroncina per neonato) JA bebîrakku NE relax m. PL ? PT (Braz.) bebê conforto RU stul'čik-krovatka SV babysitter KP infanseĝo

bet/o La manĝebla radiko de diversaj kultiv-formoj de la ordinara beto ([herbo](#) *Beta vulgaris* L.); ankaŭ tiu herbo mem. AN beet FI juurikas FR betterave f. GE die Bete HE selek HI remolacha f. HU répa IT barbabietola JA bîto, satôdaikon NE biet m. PL ? PT beterraba RU svĕkla SV beta KP folibeto, ruĝa beto

bide/o Neceseja instalaĵo por lavi la pubon kaj postaĵon. AN bidet FI bidé FR bidet m. GE das Bidet HE aslat bide HI bidé m. HU bidé IT bidè JA ? NE bidet m.(o.) PL ? PT bidé RU bide SV bidé KP neceseja seĝo = necesseĝo = necesujo

biskot/o Malpeza rebakita pantranĉaĵo. AN rusk FI korppu FR biscotte f. GE der Zwieback HE cnim HI biscote m. HU kétszersült IT fetta biscottata, pane biscottato JA kukkî, bisuketto NE beschuit m., toost m. PL ? PT (Port.) tosta; (Braz.) torrada RU suĥar' SV skorpa KP [biskvito](#), krakeno, krakpano, kringo RIM Vd. EB 97/43. [Biskvitoj](#) estas plej ofte dolĉaj, biskotoj pli panecaj.

biskvit/o Seka kuketo, dufoje aŭ longe bakita. AN biscuit, cookie FI pikkuleipä, keksi, pipari FR biscuit m. GE (trockenes Gebäck) HE biskvit, afifit HI galleta f., pasta f. (para el té) HU keksz, kétszersült IT biscotto JA bisuketto, kukkî NE biscuit m., koekje PL ? PT biscoito, bolacha RU peĉen'e (=biskvitoj), biskvit, ? keks SV skorpa, kex KP biskoto, krakeno, krakpano, kringo, [kuko](#) RIM Vd. EB 97/42. PIV1 konas ankaŭ la vorton "kekso" ("malmola kuketo, ordinare konsumata kun teo"), sed ŝajnas esti neeble trovi por ĝi internacian signifon distingeblan disde "biskvito".

blok(/et)/o = brik(et)o

blu/aĵ/o = kontuz(aĵ)o

bluz/o 1. Longa malstrikta ĉemizo (laŭ PIV1). 2. Ornamita (virina) ĉemizo. AN 1. smock 2. (virina ĉemizo) blouse FI pusero, paitapusero FR blouse f. GE die Bluse HE ĥulca, kutonet HI 1. blusón m. 2. blusa f. HU blúz IT 1. blusa, camiciotto 2. camicietta, blusetta JA burausu NE blouse v. PL ? PT 1. blusão 2. blusa RU 1. bluzo 2. bluzka SV blus KP ĉemizo

bokal/o Vazo, plej ofte vitra, kies aperturo estas larĝa kaj la kolo tre mallonga; povas havi surŝraŭbeblan kovrilon (PIV1, kun modifoj). AN jar FI purkki FR bocal m. GE das Glas HE cincenet HI tarro m.; bocal m. HU befőttesüveg IT barattolo (di

vetro) JA bin NE weckpot m. PL ? PT boiã, moringa RU banka SV (glas)burk RIM Vd. EB 41/66, 78/63. Ne miksu kun "pokalo"!

bol/ig/i Varmigi likvaĵon ĝis bolado; prepari manĝaĵon en bolanta likvaĵo. AN boil FI keittää, kieh(a)uttaa FR faire bouillir GE (auf)kochen HE le'hartiaĥ HI hervir, poner a hervir, cocer; (metante ujon en alian ujon kun bolanta akvo) calentar/preparar al baño (de) María HU forral IT far bollire, bollire (tr.), lessare JA juderu NE koken; aan de kook brengen PL ? PT ferver RU kipjatit'; varit' SV koka KP brogi, kuiri

bon/a hundo/o! Alparolo al hundo por danki aŭ trankviligi ĝin. AN good dog FI kiltti koira! FR tout doux! bon chien! GE braver Hund HE kelev tov HI ¡bravo!, ¡buen perro! HU jó kutya (nekutima) IT buono! JA orikôsan, ikoda, joŝi joŝi NE brave hond!; (Fl.) hij is braaf!, braaf! PL ? PT (Port.) bobi RU ĥoroŝaja sobaĉka! SV duktig hund, fin vovve KP sidiĝu! = sidu!

bon/a/n! Mallonga salutvorto anstataŭ "bonan matenon", "bonan tagon", "bonan vesperon". AN hi!, hello! FI hei, terve, huomenta, päivää, iltaa FR salut!, allo! GE (matene) Morgen!; (posttagmeze) Tag!; (vespere) 'n Abend! HE ŝalom! HI ¡hola!, ¡buenas! HU Kívánok!, Jónapot! IT ciao!; salve! JA jâ NE hoi!, hallo! PL ? PT (por posttagmezo aŭ vespero) "boa!" RU privet! SV hej! RIM Kompreneble "saluton!" estas la plej kutima familiara saluto.

bovl/o Ronda manĝujo malpli larĝa kaj pli profunda ol telero. AN bowl FI kulho FR bol m. GE das Schälchen HE ka'arit HI bol m., tazón m., cuenco m., fuente f. HU ? IT ciotola JA sŭpu zara NE kom v. PL ? PT tigela RU miska, piala SV skål KP suptelero

brak/um/i = ĉirkaŭ/brak/i Ĉirkaŭi iun per la brakoj kaj premi tiun ame al si. AN hug FI syleillä, halata FR embrasser, serrer (dans ses bras), prendre (dans ses bras) GE umarmen HE leĥabek HI abrazar HU (meg)ölel IT abbracciare JA dakiŝimeru NE omhelzen PL ? PT abraçar RU obnjat' SV krama

bran/pan/o Pano, en kiu oni konservis la branon; bona por sano. AN bran bread FI kokojyväleipä, grahamleipä FR pain de son m. GE das Vollkornbrot HE leĥem male HI pan m. integral HU korpás kenyér, barna kenyér IT pane integrale JA haigâiri no pan, haigapan NE zemelenbrood o. PL ? PT pão de sêmea, pão integral RU otrubnoj ĥleb, zernovoj ĥleb SV fullkornsbröd, bröd med kli KP tutgrajna = plengrajna = integra

brasik/o Iu ajn legomo aŭ furaĝplanto el la multaj malsimilaj kultiv-formoj de la ĝardena brasiko (*Brassica oleracea*, el Eŭropo) aŭ de la orientaj kultiv-formoj de la rapobrasiko (*Brassica rapa gr. Chinensis* kaj *gr. Pekinensis*) (laŭ PIV2). AN cabbage FI kaali FR chou m. GE der Kohl HE kruv HI col f. HU káposzta IT cavolo JA kjabecu NE kool m. PL ? PT couve RU kapusta SV kål RIM La nomon

"brasiko" oni uzas komunlingve ĉefe pri tiuj kultiv-formoj, kies surteraj partoj, ne radikoj, estas uzataj kiel legomoj.

bret/ar/o Meblo surplanka aŭ ĉemura kun pluraj bretoj por libroj kaj alio. AN shelf unit, set of shelves, (librobretaro) bookcase FI hyllykkö, kirjahylly FR étagère f. GE das Regal HE konanit, madafim HI estantería f. HU polc(rendszer) IT scaffale JA hondana, tana NE rek PL ? PT estante RU stellaĵ, etaĵerka SV hylla KP komodo = tirkestaro, vestoŝranko

brik(/et)/o = **blok(/et)/o** Ĉiu el la lignaj aŭ plastaj pecoj, uzataj en infanaj konstruludoj. AN brick, building block FI (rakennus)palikka FR cube m., brique de construction f. GE der (Bau)Stein, das Klötzchen HE kubija HI pieza f. HU építőkocka IT blocchetto, cubetto, pezzo (per le costruzioni) JA brokku NE blok(je) m. PL ? PT lego RU kubik SV kloss, klots, byggkloss RIM EB 40/19 proponas "lud-brikoj (lud-bloketoj)".

brog/i Trempi en bolanta akvo aŭ surverŝi per ĝi, por kuiri aŭ prepari por kuirado (PIV1, mallongigita). AN blanch, parboil FI kiehauttaa, ryöpätä FR blanchir GE abbrühen HE lishlok HI escaldar, hervir, cocer HU (le)forráz IT sbollentare; scottare JA jugaku NE blancheren PL ? PT aferventar RU oŝparit' SV skålla, förvålla KP boligi, kuiri RIM "Brogi" signifas ankaŭ "brulvundi per tre varma likvaĵo": *Propra supo brogas, fremda allogas (Z)*.

bulb/o Subtera ŝvelaĵo de plantoj kiel cepo, ajlo, tulipo k.a. AN bulb FI sipuli (kasvin osa) FR bulbe m. GE die Zwiebel HE bacal (ŝel cemaĥ) HI bulbo m. HU hagyma(gumó) IT bulbo JA kjûkon NE (bloem)bol m. PL ? PT bolbo, bulbo RU lukovica SV lök KP ajlo, cepo RIM Atentu, ke multaj lingvoj ne distingas inter "bulbo" (subtera parto de diversaj plantospecioj) kaj "cepo" (grava planto kun manĝebla bulbo).

bulk/o Malgranda mola paneto, ofte ronda, kutime tritika, dolĉa aŭ ne. AN (bread) roll FI pulla, sämpylä FR petit pain m. GE (nordgermane) das Brötchen, (sudgermane) die Semmel HE laĥmanja HI panecillo m., bollo m. HU zsemle IT panino JA rôrupan NE broodje PL ? PT pãozinho RU bulka SV bulle, småfranska KP [kuko](#)

bul/o Pli-malpli globa peco el knedeblo materialo. AN ball (ekz. meatball, snowball, fireball) FI pallo (ekz. lumipallo), pulla (ekz. lihapulla), kerä FR (pasta, viando) boulette f., (neĝo) boule f., (tero) motte f., (fadeno, lano) pelote f., (lano) balle f. GE (neĝo) der Ball, (fadeno) das Knäuel, (tero) die Kugel HE kufta'a, (neĝo) kadur ŝeleg HI bola f.; (lano) ovillo m.; (viandobulo, buleto) albóndiga f. HU gombóc, golyó IT (ĝenerale) palla; (vianda) polpetta; (fritita) crocchetta; (fadeno) gomitolo JA tama, bôru, dango, mîto bôru, jukidaruma NE bol m. (b.v. wol); (Fl.) bal m. (b.v. sneeuwbal) PL ? PT bola RU kom, komok, kolobok, (vianda) frikadel'ka, (fadeno, precipe lana) klubok SV bulle (ekz. köttbulle); klimp;

(neĝa) snöboll; (fadena) nystan KP [knedliko](#) = knedlo = knedbulo = pastobulo RIM
Uzata ankaŭ en la nomoj de diversaj manĝaĵoj, ekz. "viandobulo". Por ĉi tiu signifo
PIV1 proponas ankaŭ la vorton "knelo", kiu tamen ŝajnas ne esti uzata.

burger/o = hamburger/o = hamburg/aĵ/o Panbulko kun enmetita fritita peco el
muelita viando, kokaĵo, fiŝo aŭ vegetaĵoj. AN hamburger FI hampurilainen FR
hamburger m., hambourgeois m. GE der Hamburger HE ? HI hamburguesa f. HU
hamburger IT (panino con) medaglione di carne, "hamburger" JA hambâgâ NE
hamburger m. PL ? PT "hamburger" RU gamburger SV hamburgare, burgare KP
fritoj = terpomfingroj, kolao

buŝ/tuk/o Kvadrata tola tuko, kiun oni uzas, por ŝirmi la vestojn dum la manĝado
kaj viŝi la buŝon (PIV1); ankaŭ simuluza papera tuko. AN (table) napkin, serviette
FI lautasliina FR serviette (de table) f. GE die Serviette HE mapit HI servilleta f.
HU szalvéta IT tovagliolo, salvietta JA nappukin NE servet o. PL ? PT guardanapo
RU salfetka SV servett KP poŝtuko = naztuko

C

centrifug/i 1. Sekigi en lavmaŝino aŭ aparta centrifugilo per rapida turnado. 2. Eligi sukon el fruktoj aŭ legomoj per maŝino, kiu rapide turnas ilin. AN 1. spin-dry FI 1. lingota 2. mehustaa (mehulingolla) FR 1. essorer 2. passer à l'extracteur GE 1. schleudern 2. entsaften HE 1. le'jabeŝ HI 1. centrifugar 2 licuar/extraer el zumo mediante centrifugado HU 1. centrifugáz IT centrifugare JA 1. kansôki, 2. jûsâ NE 1. droogzwieren 2. centrifugeren PL ? PT 1. centrifugar RU 1. vyĵimat' centrifugoj SV 1. centrifugera 2. råsaftcentrifugera KP lavmaŝino, miksilo = likvigilo, pendsekigi = pendgutigi RIM En ambaŭ kazoj la maŝino estas nomata "centrifugilo"; laŭnecese oni povas paroli ekzemple pri "sukcentrifugilo".

cep/o Herbo de la specio *Allium cepa* kaj ties bulbo. AN onion FI sipuli (maustekasvi) FR oignon m. GE die Zwiebel HE bacal (jarak) HI cebolla f. HU vöröshagyma IT cipolla JA tamanegi NE ui m.; (Fl.) ajuin m. PL ? PT cebola RU luk SV lök KP ajlo, bulbo, ŝaloto = askalono, ŝenoprazo

cic/um/o Kaŭĉuka cicoforma truetita ŝtopilo, per kiu infaneto povas elsuĉi lakton el botelo (PIV1); nuntempe farata ankaŭ el aliaj materialoj, ekzemple silikono. AN (brite) nipple, (usone) teat FI pullotutti FR tétine f. GE der Sauger, der Schnuller HE pitma HI tetina f. HU cumi IT succhiotto, succhietto, tettarella JA ĉikubi NE speen v.(m.); (Fl.) tutter m. PL ? PT (Port.) tetina (Braz.) bico (de mamadeira) RU soska SV napp KP suĉumo = suĉilo RIM Ankaŭ EB (30/48) proponas "cicumo".

cikori/o Herbo de la specio *Cichorium intybus*. El cikorio oni povas fari anstataŭaĵon de kafe. AN chicory FI sikuri, juurisikuri FR chicorée f. GE die Zichorie HE cikorja, taĥlif kafe HI (por fari kafosimilan trinkaĵon) achicoria f.; (skarolo, por salato) escarola f. HU cikória IT cicoria; radicchio JA kikuziŝa NE cichorei m.(v.) PL ? PT chicória RU cikorij SV cikoria KP endivio

cinam/o Ŝelo de kelkaj arboj kaj arbustoj de la genro *Cinnamomum*, uzata kiel [spico](#). AN cinnamon FI kaneli FR cannelle f. GE der Zimt HE kinamon HI canela f. HU fahéj IT cannella JA ŝinamon NE kaneel m.(o.) PL ? PT canela RU korica SV kanel

citron/o Frukto de la specio *Citrus limon*. AN lemon FI sitruuna FR citron m. GE die Zitrone HE limon HI limón m. HU citrom IT limone JA lemon NE citroen m.(v.) PL ? PT limão RU limon SV citron KP citronpremilo

citron/prem/il/o Kuireja ilo por mane premi la sukon el citrono aŭ oranĝo. AN lemon squeezer FI tuoremehupuristin, sitruunanpuristin FR presse-citron m., (Kan.) presse-jus m. GE die Zitronenpresse HE mashêta HI exprimidor m. (de limones, de cítricos), exprimelimonos m. HU citromfacsaró IT spremilimoni, spremiagrami JA

lemon ŝiboriki NE citruspers v.(m.) PL ? PT espremedor (de limão, de laranja) RU sokovyĵimalka dlja limonov SV citronpress KP miksililo = likvigilo

Ĉ

ĉajot/o Liano de la specio *Sechium edule*; la radiko kaj precipe la frukto estas legomoj manĝataj kuiritaj, la frukto uzata ankaŭ por sukeraĵoj. AN chayote, christophine FI kajottikurpitsa FR chayote f., (Antil.) christophine f., (Antil.) brionne f., (Madagask., Polinez.) chouchoute f. GE die Chajote HE ? HI chilacayote m., cidra f. cayote HU mexikói tök IT zucchetta abissina JA ? NE ? PL ? PT chuchu RU ? SV chou-chou, chayote, kayote

ĉapel/o Kapvestaĵo el pli-mapli malmola materialo, kun ĉirkaŭrando; simila ombrelforma parto de multaj fungoj. AN hat; (de fungo) cap FI hattu; (de fungo) lakki FR chapeau m. GE der Hut HE kova, migba'at HI sombrero m.; (de fungo) sombrerillo m., sombrerete m. HU kalap IT cappello JA bôŝi NE hoed m. PL ? PT chapéu RU ŝljapa; (de fungo) ŝljapka SV hatt KP ĉapo

ĉap/o [1] Ĉia kapvestaĵo sen ĉirkaŭrando. AN cap, bonnet FI lakki, myssy, hattu FR bonnet m., (Kan.) tuque f. GE die Mütze, die Kappe HE kova HI gorro m. HU sapka IT berretto JA bôŝi NE muts v.(m.), hoedje PL ? PT chapéu sem aba RU ŝapka SV mössa KP ĉapelo RIM Laŭ PIV1, fungoj havas "ĉapelon", ne "ĉapon".

ĉap/o [2] Peco, per kiu oni fermas botelon, skribilon aŭ similan objekton surmetante, surpremante aŭ surŝraŭbante ĝin. AN cap, bottle-top FI (kruunu)korkki, hattu FR (sur skribilo) capuchon m.; (sur botelo) bouchon m. GE der Kronenkorken, die Kappe HE pkak HI (sur boteloj) tapón m.; (sur skribiloj) capuchón m. HU kupak IT tappo (...), tappetto; cappuccio, cappuccetto JA bin no futa; kjappu NE (botelo) kroonkurk m., (skribiloj k.s.) dop m. PL ? PT tampa RU probka, kryŝka, kolpaĉok SV (sur botelo) kapsyl; (sur skribilo) hatt KP fermilo, kovrilo [1], ŝtopilo [1] RIM Tian ĉapon oni povas ankaŭ konsideri speco de ŝtopilo [1].

ĉar/et/o KP infanĉareto; aĉetĉareto

ĉemiz/o Trunkvestaĵo proksima al la haŭto — kun manikoj longaj aŭ mallongaj, malfermebla antaŭe aŭ ne. Sub ĝi povas esti nur subĉemizo. AN shirt, (virina) blouse FI paita FR chemise f. GE das (Ober)Hemd HE gufija HI camisa f. HU ing IT camicia, camicetta; ? maglietta JA ŝitagi NE hemd o. PL ? PT camisa RU rubaŝka SV skjorta KP bluzo, jako, pulovero = pulovro, subĉemizo, T-ĉemizo

ĉerp/il/o KP kulerego

ĉif/i Kunpremi ion tiel, ke ĝi ekhavas amason da malregulaj faldoj. AN crumple FI rypistää FR chiffonner GE zerdrücken, zerknittern, zerknautschen HE le'kamet HI

estrujar, arrugar HU gyűr IT sgualcire; spiegazzare JA ŝiŭakuĉa ni suru NE (ver)kreuk(el)en PL ? PT amarrotar RU mjat' SV skrynkla till

ĉifon/o Peco de ŝtofo, ofte ŝirita aŭ difektita, kiu povas tamen esti uzata en purigado de la hejmo por viŝi aŭ sorbi. AN rag FI riepu, rätti, räsy, rääsy FR chiffon m. GE der Fetzen (ĉifonoj = die Fetzen, die Lumpen) HE smartut HI trapo m., andrajo m., harapo m. HU rongy IT straccio, cencio JA borogire NE dweil m. PL ? PT trapo RU trjapka SV trasa

ĉips/o/j = ter/pom/flok/o/j Tre maldikaj tranĉaĵoj el terpomo, frititaj aŭ bakitaj, sekaj kaj krakaj, manĝataj ne varmigataj sed plej ofte salitaj. AN (brite) crisps, (usone) chips FI perunalastut, sipsit FR croustilles f.pl., chips m.pl. GE die Kartoffelflocken, die Chips HE ĉips HI patatas/papas (Am.) f.pl. fritas (de bolsa) HU csipsz IT patatine (fritte) (molto sottili) JA poteto ĉippu NE chips PL ? PT fritas, batatinha frita RU ĉipsy SV chips KP fritoj = terpomfingroj

ĉirkaŭ/brak/i = brakumi

ĉokolad/o 1. Bongusta solida pasto el kakao, sukero kaj aromaĵoj. 2. Trinkajo el kaka pulvoro, sukero kaj lakto aŭ akvo. AN 1. chocolate 2. hot chocolate, cocoa FI 1. suklaa 2. kaakao(juoma) FR chocolat m. GE 1. die Schokolade 2. die (Trink)Schokolade HE ŝokolad HI chocolate m. HU 1. csokoládé 2. kakaó (ital) IT 1. cioccolato, cioccolata 2. cioccolata (bevanda calda) JA 1. ĉokorĉeto, 2. kokoa NE 1. chocola(de) m. 2. chocolademelk v.; (Fl.) chocomelk v. PL ? PT 1.chocolate 2.chocolate quente RU ŝokolad SV choklad KP kakao RIM La trinkaĵo estas nomata ankaŭ "kakao".

D

degel/i Malglaciigi, likviigi aŭ fandiigi pro varmo. AN thaw, thaw out, melt FI sulaa FR dégeler, fondre GE (auf)tauen HE le'hafŝir HI deshelarse, fundirse, derretirse HU olvad IT sgelare, disgelare JA tokeru NE (vetero) dooien, (frostigitaj manĝaĵoj) ontdooien PL ? PT derreter RU tajat' SV töa, smälta KP degel(veter)o

degel(/veter)/o Pli varma vetero post frosto (PIV1 degelo 2). AN thaw FI suoja(sää) FR fonte f., dégel m. GE das Tauwetter HE hafŝara (ĥamimut) HI deshielo m. HU olvadás IT disgelo JA jukidoke (no kesecu) NE dooi m. PL ? PT degelo RU ottepel' SV tö, dagsmeja KP degeli

dent(/o)/bros/o Broseto por purigi la dentojn. AN toothbrush FI hammasharja FR brosse à dents f. GE die Zahnbürste HE mivreŝet ŝinajim HI cepillo m. de dientes HU fogkefe IT spazzolino da denti JA haburaŝi NE tandenborstel m. PL ? PT escova (de dentes) RU zubnaja ŝĉĉetka SV tandborste KP dent(o)fadeno, dent(o)pasto, dent(o)pikilo

dent(/o)/faden/o Fadeno por purigi inter la dentoj. AN dental floss FI hammaslanka FR soie dentaire f. GE die Zahnseide HE ĥut dentali HI hilo m. dental HU fogselyem IT filo interdendale JA itojôji NE tanddraadje PL ? PT fio dental RU nitka dlja ĉistki zubov SV tandtråd KP dent(o)broso, dent(o)pasto, dent(o)pikilo

dent(/o)/past/o Pasto por purigi la dentojn uzante dentbroson. AN toothpaste FI hammastahna FR dentifrice m. GE die Zahncreme, die Zahnpasta HE miŝhat ŝinajim HI pasta f. de dientes, dentífrico m. HU fogkrém IT dentifricio JA hamigaki, nerihamigaki NE tandpasta m. PL ? PT pasta de dentes, creme dental RU zubnaja pasta SV tandkräm KP dent(o)broso, dent(o)fadeno, dent(o)pikilo

dent(/o)/pik/il/o Ligna spliteto por purigi inter la dentoj. AN toothpick FI hammastikku FR cure-dent m., cure-dents m.inv. GE der Zahnstocher HE kism (dentali) HI palillo m. (de dientes), mondadientes m. HU fogpiszkáló, fogvájó IT stuzzicadenti, stecchino JA cumajôji NE tandenstoker m. PL ? PT palito de dentes RU zuboĉistka SV tandsticka, tandpetare KP dent(o)broso, dent(o)fadeno, dent(o)pasto

deterg/ant/o = [lesivo](#)

dik/fingr/o = **poleks/o** La plej dika fingro de la mano, kontraŭmetebla al la kvar ceteraj. AN thumb FI peukalo FR pouce m. GE der Daumen HE agudal HI (dedo) pulgar m., dedo gordo m. HU hüvelykujj IT pollice JA ojajubi NE duim m. PL ? PT polegar RU bol'ŝoj palec SV tumme KP montrofingro, mezfingro = meza fingro, ring(o)fingro, etfingro = eta fingro

disk/i numer/o/n KP klavi numeron

dom/best/o Malsovaĝa besto vivanta kune kun homoj, ĉu kiel bona produktobesto aŭ ŝargobesto, ĉu kiel hejma servobesto aŭ dorlotbesto. AN domestic animal FI kotieläin FR animal domestique m. GE das Haustier HE (hejmbesto) ĥajat maĥmad; ĥajat bajit HI animal m. doméstico/de compañía HU háziállat IT animale domestico JA kaĉiku, petto NE huisdier o. PL ? PT animal doméstico RU domaŝnee ĵivotnoje SV husdjur KP hejmbesto = dorlotbesto

dorlot/best/o = hejmbesto

dorm/o/ĉambr/o Ĉambro, kie oni dormas. AN bedroom FI makuuhuone FR chambre (à coucher) f. GE das Schlafzimmer HE ĥadar-ŝena HI dormitorio m. HU hálószoba IT camera da letto JA ŝinŝicu NE slaapkamer v.(m.) PL ? PT quarto RU spal'nja SV sovrum KP [salono](#)

dram/seri/o Televida fikciaĵo dividita en plurajn partojn, dissendatajn je malsamaj okazoj, ofte je regulaj tago kaj horo. AN television series FI televisiosarja,

sarjaohjelma FR feuilleton m., (Kan.) téléroman m. GE die Fernsehserie HE sidra, sidrat televizja HI serie f., telenovela f., (melodrama) culebrón m. HU filmsorozat IT teleromanzo (a puntate); telenovela JA renzoku dorama NE feuilleton o., televisieserie v. PL ? PT telenovela, novela RU serial SV TV-serie

E

ekzamen/o (En lernejo:) 1. Lerneja kontrolo, kutime skriba, pri akiritaj scioj en iu fako 2. Fina kontrolo por sukcese trapasi gradon en studado. AN examination, exam FI 1. koe, tentti 2. tutkinto FR examen m. GE 1. (skribe) der Test, die (Klassen)Arbeit, die Klausur; (buŝe) die (mündliche) Prüfung 2. das Examen HE bĥina, boĥan HI 1. prueba f., examen m. 2. examen m. (final), reválida f. HU vizsga IT 1. prova (di verifica), verifica, compito (in classe) 2. esame JA ŝiken, testo NE 1. test m. 2. examen PL ? PT 1. teste, exame 2. prova final RU ekzamen SV 1. skrivning, tentamen 2. examen KP fako, kaŝhelpilo, noto

elektr/a rul/seĝ/o = motora rulseĝo

element/a lern/ej/o = bazlernejo

el/lad/ig/il/o = **lad/mal/ferm/il/o** Ilo por malfermi lutitan ladskatolon, en kiu oni konservas manĝaĵon. AN tin opener, can opener FI purkinavaaja FR ouvre-boîte m. GE der Büchsenöffner HE pothán kufsaot HI abrelatas m. HU konzervnyitó IT apriscatole JA kankiri NE blikopener m. PL ? PT abre-latas (Braz.) abridor de latas RU otkryvaŝka, otkryvalka, konservnyj ključ, konservnyj noĵ SV konservöppnare, burköppnare KP korktirilo, ladmanĝaĵo

endivi/o Herbo de la specio *Cichorium endivia*. AN endive FI endiivi FR endive f. GE die Endivie HE oleŝ HI endibia, endivia f.; escarola f. HU salátakatáng IT indivia; scarola JA ? kikuziŝa NE andijvie v.(m.) PL ? PT chicarola, endívia, escarola RU èndivij, salatnyj cikorij SV endive, chicorée-sallad KP cikorio

en/konstru/it/a Havanta sian apartan funkcion, sed estanta fiksita parto de aparato, meblo aŭ simila. AN built-in, fitted FI sisäänrakennettu FR incorporé, intégré GE eingebaut HE movne, built-in HI (ŝranko) empotrado; incorporado HU beépített IT incorporato JA naizôsareta NE ingebouwd PL ? PT embutido, incorporado RU vstroennyj SV inbyggd RIM Uzata precipe pri partoj, kiuj ne troviĝas en pli malmultekostaj aŭ pli malmodernaj produktoj.

et/a fingr/o = etfingro

et/fingr/o = **et/a fingr/o** La plej malgranda fingro de la mano, la plej malproksima de la dikfingro. AN little finger FI pikkusormi, pikkurilli FR auriculaire m., petit doigt m. GE der kleine Finger HE zeret HI (dedo) meñique m. HU kisujj IT mignolo JA kojubi NE pink m. PL ? PT mindinho, mínimo RU mizinec SV lillfinger KP dikfingro = polekso, montrofingro, mezfingro = meza fingro, ring(o)fingro

F

([fabo](#) [forno](#) [furorkanto](#))

fab/o 1. Planto *Vicia faba* L. kaj ĝia enguŝa grajno, uzata kiel homa aŭ besta mangaĵo. 2. Renforma manĝebla grajno de diversaj plantoj, ekzemple fazeolo, kafarbo, [sojfabujo](#). AN bean FI 1. härkäpapu 2. papu FR 1. fève f., (Kan.) gourgane f. 2. haricot m., fève (de cacao, de café) f. GE 1. die Bohne(npflanze) 2. die Bohne HE afuna HI 1. (besta manĝaĵo) haba f. panosa. 2. haba f. HU bab IT 1. fava JA soramame NE boon PL ? PT fava RU bob SV 1. bondböna 2. böna KP fazeolo, kikero, [nukso](#)

fak/o (En lernejo:) aparta branĉo de lernado, ekz. geografio, matematiko. AN subject FI (oppi)aine FR matière f., discipline f. GE das Fach HE mikĉo'a HI asignatura f., materia f. HU (tan)tárgy IT materia JA kamoku NE vak o. PL ? PT matéria, disciplina escolar RU učebnyj predmet, učebnaja disciplina, nauka SV (skol)ämne KP ekzameno, noto

faks/i = tele/kopi/i Sendi per faksilo (PIV2). AN fax FI faksata FR télécopier GE faxen HE lefakses HI transmitir/enviar por fax, faxear HU faxol IT faxare, mandare per fax JA fakkusu de (okuru/sôŝin suru) NE faxen PL ? PT passar um fax RU otravit' faks SV faxa KP faksilo, fakso

faks/il/o = tele/kopi/il/o Aparato por sendi kaj ricevi tekstojn aŭ bildojn per normala telefonlineo, bitigante presitan aŭ skribitan paperon ĉe la sendanto kaj represante ĝin ĉe la ricevanto (PIV2). AN fax machine FI faksi (laite) FR télécopieur m. GE das Fax(gerät) HE faks HI fax m. HU fax(készülék) IT (apparecchio di) (tele)fax, telecopiatore JA fakkusu NE fax m., faxtoestel o. PL ? PT fax, fac-símile RU faks SV en fax(apparat) KP faksi, fakso RIM Anstataŭ "faksnumero", pli ĝusta esprimo estas "faksilnumero", ĉar "fakso" estas la sendaĵo, ne la aparato.

faks/o = tele/kopi/o Skribaĵo aŭ desegno sendata per faksilo (PIV2). AN fax FI (lähetetty) faksi, telekopio FR fac-similé m., fax m. GE das Fax NE fax m. HI fax m. HU fax(üzenet), telefax IT (tele)fax, telecopia JA fakkusu sôŝinbucu NE ? PL ? PT fax, fac-símile RU faks SV ett fax KP faksi, faksilo

fald/ĉar(/et)/o Sidĉareto, kiu kunfaldita okupas malmultan spacon. AN collapsible push-chair, umbrella stroller FI sateenvarjorattaat, matkarattaat FR poussette (pliante, parapluie) f. GE der Buggy HE agala mitkapelet HI sillita f. plegable (faldebla sidĉareto) HU sport (összecsukható) babakocsi IT passeggino (pieghevole) JA bagî NE buggy m. PL ? PT carrinho dobrável RU skladnaja sidjaĉaja koljaska SV hopfällbar sittvagn, sulky KP infanĉar(et)o, sidĉar(et)o

famili/a ĉambr/o KP [salono](#)

farĉ/o Hakita kaj spicita viando, legomaĵo aŭ fruktaĵo, kiun oni enmetas en la internon de bakaĵo aŭ kuirota legomo aŭ besto. AN stuffing FI täyte (ruoassa) FR farce f. GE die Füllung HE ? miluj basar HI relleno m. HU töltelék IT ripieno; farcia JA cumemono NE vulling v. PL ? PT recheio RU farŝ, naĉinka SV färsfyllning KP rembur(aĵ)o

fazeol/o Planto el la genro *Phaseolus* kaj ĝiaj guŝo kaj semo, uzataj kiel legomo. AN French bean FI papu FR haricot m. GE die Bohne HE ŝe'u'it HI judía f., habichuela f., alubia f., frijol m. HU zöldbab IT fagiolo JA ingenmane NE boon v.(m.) PL ? PT feijão RU fasol' SV böna KP [fabo](#)

fenkol/o Herbo *Foeniculum vulgare*, uzata kiel [spico](#) (la semoj) kaj legomo (la tigo). AN fennel FI fenkoli FR fenouil m. GE der Fenchel HE ŝumar HI hinojo m. HU édeskömény IT finocchio JA uikjô NE venkel v.(m.) PL ? PT funcho RU ukrop, fenxhel' SV fänkål

ferm/il/o Ĉia aparato, ilo por fermi (PIV1). Ekzemple: de fenestro, de kofro, de botelo, de skatolo. AN catch, top, lid, cap, cover, stopper, fastener FI suljin, haka, solki, lukko, korkki, kansi FR loquet m., bouchon m., couvercle m., capuchon m., agrafe f., crochet m. GE das Schloss, der Riegel, der Schließer, der Verschluss HE p'kak, miĥse HI cierre m., pestillo m., cerrojo m.; broche m.; tapón m., tapa f., tapadera f., capuchón m. HU zár IT chiusura; coperchio; tappo; cappuccio; ? serratura; ? lucchetto; ? catenaccio; ? fibbia JA tomegane NE deksel o., dop m., (kroon)kurk m., sluiting v. PL ? PT aldrava, fecho, ferrolho, tampa RU zastějka, kryŝka, zadviĵka, probka, ktp. SV lock, kapsyl, kork, hake, regel KP ĉapo [2], kovrilo [1], lap(fermil)o, ŝtopilo [1], zipo RIM "Fermilo" estas taŭga vorto por ĉiutaga uzo, kvankam plej ofte troveblas ankaŭ pli ekzakta termino. EB bildigas dekon da diversaj fermiloj.

fig/o Ŝajnfrukto de figarbo (figujo) el la genro *Ficus*, manĝata freŝa aŭ sekigita. AN fig FI viikuna FR figue f. GE die Feige HE te'ena HI higo m.; (frua figo) breva f. HU füge IT fico JA iĉiĝiku NE vijg v.(m.) PL ? PT figo RU figa, inĵir; (arĥaika, biblia) smokva SV fikon

fi/herb/o = trudherbo

flam/ret/o = kaserolsubtenilo

flar/il/o KP (gas)flarilo = gasetektilo sub "[G](#)"

foli/bet/o Iuj ajn kultiv-formo de la ordinara beto ([herbo](#) *Beta vulgaris* L.), produktanta manĝeblajn foliojn; tiuj folioj mem. AN chard, white beet FI lehtijuurikas, (lehti)mangoldi FR bette (à cardes) f., carde f., blette f., poirée f. GE

der Mangold HE ? selek alim HI remolacha f. HU mángold IT bietola (bianca), bieta (da coste) JA bîto no ha (?) NE snijbiet v. PL ? PT acelga RU svekol'naja botva, listovaja svëkla SV mangold KP beto, ruĝa beto RIM Komento de Klaŭdo Roux: "En la francaj-esperantaj kaj esperantaj-francaj vortaroj folibeto estas grave erare tradukita al blito. Folibeto ŝajne estas manĝata nur en sudaj landoj."

fork(/et)/o = manĝ/o/fork/o Forko uzata por manĝi. AN fork FI haarukka FR fourchette f. GE die (Ess)Gabel (forketo: das Gâbelchen) HE mazleg HI tenedor m. HU villa (étkezési) IT forchetta JA fôku NE vork v.(m.), vorkje PL ? PT garfo RU vilka SV gaffel RIM La sufikso *-et-* ne estas necesa por indiki, ke temas pri manĝoforko: *manĝilaro, kiu konsistis el kulero, tranĉilo, forko (Z).*

fornel/o = kuir/forn/o

forn/o Ĉiaspeca, masonita aŭ metala, fajrujo aŭ elektra varmigilo por kuiri aŭ hejti. AN (por kuiri) oven; (por hejti) stove FI liesi, uuni, hella; (en saŭno) kiuas FR poêle m. GE der Herd, der Ofen HE tanur HI horno m., (fornelo) cocina f., (stovo) estufa f. HU tûzhely IT stufa; forno; cucina JA ôbun NE oven m. PL ? PT forno RU peĉ' SV spis, ugn KP bakforno = bakujo, kuirforno = fornelo, hejt(o)forno, radiatoro

forn/o/gant/o = izol/gant/o Remburita ganto por teni varmajn kuirilojn. AN oven glove FI uunikinnas FR (Fr.) manique f., (Kan.) poignée f. GE der Grillhandschuh HE ? kfafat biŝul HI guante m./manopla f. (para el horno), agarrador m. de cocina HU edényfogó (kesztyű) IT guanto da forno JA nabecukami NE ovenwant v.(m.), pannelap m./v. PL ? PT (Port.) pega RU varejka, rukavica SV ugnsvante, grillvante

fos/maŝin/o Fortika motorhava maŝino por fosi, ordinare iranta sur raŭpoj aŭ radoj, kun fosilego sur meĥanika brako. AN excavator FI kaivuri, kaivinkone FR pelle (mécanique) f., excavatrice f. GE der Löffelbagger HE maĥper HI excavadora f. HU markológép IT (e)scavatore, (e)scavatrice JA ŝoberukâ NE graafmachine v. PL ? PT retroescavadora, escavadeira RU èkskavator SV grävmaskin RIM Vortaroj enhavas ankaŭ "elkavatoro", sed ĝi estas evitinda, ĉar la verbo devus ja esti "elkavigi"; la maŝino ne kavigas, sed fosas kaj ŝovelas; kaj "-ator-" apenaŭ estas pli mallonga ol "-maŝin-".

frid/eg/uj/o = frost(ig)ujo

